

# *Kluba Bulteno*

Organo de Klubo Esperantista en Oslo

N-ro 1 2009

Vendredon la 16an de januaro

57a jaro

---

## Kalendaro

(Ni komencas je la 19a horo. Kie? / Hvor? – vd. ĉi-malsupre / se nederst.)

**Lundon la 19an de januaro** (semajno / uke 4) – mandag

Zamenhof – 150-jara jubileo ĉi-jare. Kiel prezenti lin, ekz-e en gazeta kroniko, nun en la 21a jarcento?

*Zamenhof – 150års jubileum i år. Hvordan skrive om ham, f.eks. i en aviskronikk, nå i det 21. århundret?*

**Lundon la 2an de februaro** (semajno / uke 6) – mandag

Mramba Simba – mirinda esperantisto en Tanzanio. Snorre Benum vizitis E-aktivulon kaj instruis E-kurson tie. Li prezentos sian pritakson de tiu aranĝo.

*Mramba Simba – en bemerkelsesverdig esperantist i Tanzania. Snorre Benum besøkte ham og holdt E-kurs der. Han legger fram sin vurdering av tiltaket.*

**Lundon la 16an de februaro** (semajno / uke 8) – mandag

La financa krizo. Ĉu la klubo investu en akcifonduso? Unu membro skribas: Hodiaŭ ĉio malmultekostas. Ĉi tia okazo ne revenos en multaj jardekoj!

*Finanskrisen. Bør klubben investere i aksjefond? Et medlem skriver: "I dag er alt billig. En slik anledning kommer neppe igjen på mange tiår!"*

**LUNdon la 2an de marto** (semajno / uke 10) – MANDag

JARKUNVENO vd. p. 3.

ÅRSMØTE se s.3.

**Lundon la 16an de marto** (semajno / uke 12) – mandag

Manĝaĵoj kiuj protektas kontraŭ kancero – fruktoj, legomoj ... Asbjørn Lindh klarigos kiel ili efikas – kun praktika gustumigo.

*Kosthold som beskytter mot kreft – frukt, grønnsaker ..... Asbjørn Lindh forklarer virkningen – og tilbyr smakebiter.*

---

**Kunvenejo:** Olaf Schous vei 18 (enirejo Schouterrassen) på Sinsen. Buso 31 aŭ tramo 17 al Rosenhoff kaj iru supren laŭ Båhusveien – aŭ malsupren de Sinsen T (buso, metroo) / Sinsenterrassen (tramo)

## OKAZIS

En la **unua oktobra kunveno** ni gastigis du «novulojn»: unu el ili eklernis Esperanton antaŭ ses jaroj, la alia estis lia etiopia kamarado. Do la kunveno estis plejparte kurseto pri bazoj de Esperanto. Ĝi estis ankaŭ tre interesa por mi, ĉar mi vidis, ke pli bona estas babilado kaj ripetado de bazaj frazoj inter ni, ol rekta komenco de lernado. Nia etiopia gasto klarigis, ke li pensis, ke neŭtrala lingvo povas esti efika solvo de la etnaj problemoj de sia lando. Lia rakonto pensigis nin pri la historio de Zamenhof. La uzo de nia neŭtrala lingvo estas interesa en afrikaj landoj ĉar ĝi ne estas lingvo de la antaŭaj koloniantoj.

Dum la kluba kunveno de la **20-a de oktobro** ni parolis pri vegetarismo. La prezento de Bjørn K. Øyen rapide transiris al debato. Ni unue parolis pri la kialoj de vegetarismo pro religio, kaj pri la malsamaj tipoj de vegetarismo (vegano, lakta vegetarano, lakt-ova vegetarano). Multaj informoj cirkulis eĉ pri la prahistorio, ĉar fakte unu el la fundamentaj aferoj estas «kia estas la natura manĝmaniero por la homa korpo?» Oni ofte kredas scii ĉion pri vegetarismo, sed en la esperanto-kunvenoj dank' al la diverseco de deveno de ĉiuj, oni ĉiam lernas ion. Ekzemple mi lernis, ke oni povas fariĝi vegetarano, nur ĉar vegetaraĵoj povas esti bongustaj! Tion ĉiuj aprobis manĝante la salaton, kiun nia preleganto preparis.

Raportis Nicolas

### Lundon la 3an de novembro

Heming surtabligis pladojn kun nordhordalantaj specialaĵoj: tri specoj de dolĉaj kukoj, kiujn li preparis laŭ receptoj de sia avino – kiujn ŝi heredis de siaj patrino kaj avino ..... Unu el ili respureblas al kuirlibro el la 1780aj jaroj.

Ni facile forvoris la kukojn, sed ne same facile trovis Esperantajn vortojn por ĉiuj ingrediencoj – *melis* kaj *hornsalt* restas netradukeblaj, almenaŭ per PIVaj vortoj. Ni ankaŭ aŭdis pri planoj de NJE kaj TEJO kaj diskutis pri gestolingvoj.

### Lundon la 17an de novembro

En la lastaj jaroj oni observis tendencon, ne nur en Norvegio, ke novuloj lernas Esperanton ne per ĉeesta kurso, sed individue kaj perkomputile. Sed ĉi-somere por la unua fojo oni invitis la partoprenantojn de la plej populara komputila kurs-(ar)o, "lernu.net", al vizaĝ-al-vizaĝa renkontiĝo kaj tie, en Slovakio, partoprenis nia membro Geir Langård. Oni ofertis lingvokursojn je pluraj niveloj kaj multan kulturon. Geir estis ĝenerale kontenta pri la aranĝo – sed spertis traŭmatajn travivaĵojn en Bratislava antaŭ ol li trovis la vojon tien. Partoprenis 105 homoj, en

ĉiuj aĝoj kaj el multaj landoj, sed eble duono venis pro la kunfandita "Somera Esperanto-Studado". Por komparo: al "lernu" registriĝis tra la jaroj entute 61 000!

Ĉu estas bezono por pliaj tiaj renkontiĝoj por izolitaj komencantoj kaj –intoj? Ĉu ni devus provi aranĝi ion pli proksime, en Nordio?

### Lundon la unuan de decembro

Ni rigardis, komparis kaj diskutis la plej popularajn internaciajn gazetojn – laŭ enhavo, tendenco, paĝaranĝo kaj paperkvalito. Ni trovis ke kelkaj el ili ŝajnas ne trafi la celaron: *Komencanto* ne estas la lingve plej fidinda revuo por komencantoj, *Juna Amiko* ne havas sufiĉe da desegnaĵoj kaj grandaj literoj por allogi infanojn, *Kontakto* eble kontaktigas nur studentojn kaj aliajn intelektulojn, *Esperanto* ne estas pri la tuta Esperantomondo sed pri tiu de UEA - kaj la frontpaĝo de *Heroldo* heroldas antaŭ ĉio la Civiton. Tamen ni emfaze malkonfirmas ies asertojn pri revuo *Esperanto* ke ĝi estas malinteresa, kaj ni aŭdis ke *Monato*, kvankam iom movadema kompare kun la unua epoko (ekde 1980), nun estas malpli movadema ol antaŭ kelkaj jaroj. Krom la konataj revuoj, ni trarigardis ankaŭ jarkolekton de *Freŝo*, el Pollando, kiu almenaŭ prezentas pli multajn kaj pli freŝajn bildojn ol la aliaj.

### Lundon la 15an de decembro

La Zamenhofa Tago – la Tago de la Libro. Do ni trarigardis la librojn en la vendobretaro kaj voĉlegis noveletojn de István Nemere kaj Sten Johansson.

Raportis Douglas

---

## Jarkunveno, lundon 2. marto – tagordo

1. Aprobo de la kunvoko
2. Elekto de prezidanto de la kunveno kaj de protokolanto.
3. Jarraporto (Ni antaŭsendos ĝin paperpoŝte al tiuj kiuj petos ĝin.)
4. Jarkalkulo (same)
5. Eventualaj ricevitaj proponoj
6. Elektoj: estraro, revizoro kaj reprezentanto en la domkomisiono, ĉiuj kun anstataŭanto(j), kaj nova elekta komisiono.

ĈU VI havas **proponon** por la jarkunveno? Ĝi atingu la estraron plej malfrue tri semajnojn antaŭ la kunveno – t.e. lundo de semajno 7 aŭ la 9a de februaro. (Por statutŝanĝoj la limdato estis jam 10. januaro, kaj neniu propono venis.)

*HAR DU FORSLAG til behandling på årsmøtet?*

*Styret må ha det senest tre uker før møtet, dvs. mandag 9. februar.*

**Por kovri la plialtiĝintan domluon ni volas luigi nian kunvenĉambron en Sinsen al eksteruloj. Ĉu vi scias pri organizo aŭ grupo kiu volus lui por vespero aŭ semajnfino? Broŝuro kun detalaj informoj kaj bildoj haveblas.**

## Odd Tangerud 90-jariĝos

dimanĉon 8 marto. Li invitas nin al Vestby meze de la tago. Bv. turni vin al nia oficejo por pli ekzaktaj informoj.

---

En la **Deichman-filio de Bjerke** ni renkontos la publikon (*Lokalbenk*) sabatan 14 februaro. Ĉu iu volas veni helpi? Nia libro-ekspozicieto staros tie dum la antaŭa kaj la posta semajnoj. Vi povos ankaŭ mendi ĝin por **via** loka biblioteko.

## Ĉu vi havas spacon hejme

por stoki (forpakitajn) librojn? Ni bezonas liberigi spacon en la kelo de Esperantonia. Bv. turni vin al nia oficejo se vi eble povos helpi.

## Kruĉetoj

Ni havas kelkajn te-kruĉetojn / *te-krus* el Svedio kun E-emblemo (vd. *Norvega Esperantisto* 4/2008, dorsan paĝon) por vendo al klubanoj. Prezo: po 30 kronoj.

---

## Nekrologo

### Inger Richard (1917 – 2008)

Inger Richard mortis la 3an de oktobro post mallonga malsano.

Ŝi estis la lasta el tiu grupo de Oslo-klubanoj kiu aktivis jam en la flora periodo antaŭ la milito: Inger eklernis Esperanton en Sandefjord en 1932 – ni heredis bildon kiu montras sesdekon da kursanoj! Fine de la 30aj jaroj Inger transloĝiĝis al Oslo, kie ŝi aktivis en la klubo dum pli ol kvindek jaroj. Ankaŭ ŝia frato, Alf Hasle (1913 – 76; membro 1932 – 48), vigle kontribuis al la kluba vivo, i.a. verkante la gvidlibron *Esperantista Studrondo*.

Ĉiaŭtuna temo de kluba kunveno dum longa periodo estis ”La verd fingrulinaj”, kiam Inger kaj Pepita prezentis mirindajn kaj ofte strangajn produktojn el siaj ĝardenoj – per iliaj Esperantaj nomoj. Plian lingvan ekzercadon ofertis Inger en la 70-aj kaj 80aj jaroj gvidante konversacian rondon *Verda Lundo* – ŝi estis la kluba studgvidanto 1981-84. Ŝia lasta agadkampo estis la ekspedado de *Norvega Esperantisto*, pri kiu ŝi fidele helpadis ĝis tiu tasko transiris al Trondheim en 2002. La klubo celebris ŝian 90-jariĝon lastjare per vizito kaj gvidado tra ŝia impona ĝardeno. Ni firme intencis reveni post dek jaroj, sed nun pri tio ni devos rezigni.

---

**Mortis ankaŭ:** Ib Berrum, Langhus, 86-jara, membro 1994 – 2000, partopreninto de pluraj studrondoj.

Klubo Esperantista en Oslo, Olaf Schous vei 18, 0572 Oslo.

Tlf. 22 35 08 94

[www.esperanto.no/oslo](http://www.esperanto.no/oslo)

Retpoŝto: [oficejo\[a\]esperanto.no](mailto:oficejo[a]esperanto.no)

Postĝiro 0532 36 19699 (sed kotizon pagu al NEL 0533 05 22870).